# Svisa Esperanto-Societo informas

**1998 numero 1a: februaro**



Redakcio: Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso:ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude Gacond


# Vivo de SES

## Invito al la Ĝenerala Jarkunveno de SES

**Basel: 21 marto 1998: 14-16 h**
**Eklezia Centro Riehenring 129**

La kadro de la ĉijara jarkunveno estos pli varia ol kutime. Tiun ĉi kunsidon ĉirkaŭos antaŭa rendevuo de aktivuloj kaj posta kultura programo. La tuto havos internacian aspekton, ĉar okazos samtempe trilanda renkontiĝo, al kiu ni atendas francajn kaj germanajn amikojn. La kompleta programo jam aperis en la decembra *SESi 97-5*. En tiu ĉi numero aperas sciigoj pri la rendevuo de aktivuloj kaj la tagordo de la ĝenerala kunveno.

## Tagordo

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Aprobo de la protokolo pri la lastjara jakunveno (15.3.97) publikigita en *SESi 97-4*.
4. Agadraporto, entenata en tiu ĉi numero.
5. Jarkalkulo, bilanco, buĝeto.
7. Raporto de la kaskontrolantoj.
8. Statutŝanĝo, artikolo 7a. La estraro proponas altigi la aĝlimon de la junuloj de 26 al 29 jaroj, konforme al JES kaj TEJO, kaj malaltigi la jarkotizon por tiu kategorio de 45 al 25 frankoj. Ni strebas plian proksimiĝon inter SES kaj JES.
9. Diversaĵoj.

**Proponoj** al la ĝenerala kunveno devas atingi la prezidanton ĝis la 12a de marto. Adreso: Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen.

## Agadraporto 1997

**Estraro:**

La 15an de marto 1997 la ĝenerala kunveno elektis laŭstatute novan estraron, kiu samtage atribuis jene la funkciojn:

Bruno Graf: prezidanto; Perla Martinelli: vicprezidanto kaj itallingva reprezentanto; Angêlo Mellini: sekretario kaj germanlingva reprezentanto; Nicole Margot: franclingva reprezentanto; Ernst von May: kasisto; Nicole Béroud: protokolanto; Barbara Pochanke: estonta kasisto. Ŝi transprenos sian kasistan funkcion la 4an de aprilo. Jen ŝia adreso: Barbara POCHANKE, Lettenstr. 70, 9500 WIL. ☎ 071 911 68 30.

**Kunvenoj:**

La estraro kunvenis tri fojojn la sabaton en Bern. En Romandio la 6/7-an de septembro okazis en Cully la tradicia regiona kunveno, kie prelegis akademiano André Cherpillod. La novaj centraj fakaj tagoj debutis la 15an de novembro en Bern per metodika seminario. Claude Gacond prezentis sian dum multaj jaroj ellaboritan perbildan instrumetodon per formado al la uzo de la *Enkonduka Kurso*. Sendepende de SES kunsidis regule lokaj grupoj en Basel, Genève, Lausanne, Luzern, Wil kaj Zürich.

**Informado:**

La societa bulteno *SES informas*, redaktita de Claude Gacond, aperis kvinfoje. La membroj ricevis krome la revuon *Literatura Foiro*. Danke al LF-Koop ili povos elekti anstataŭe la gazeton *Heroldo de Esperanto*. Eblis restarigi la gazetaran servon. Andy Künzli verkis kaj dissendis en oktobro unuan numeron germanlingve sub la titolo *Lingvo*.

**Varbado:**

La estraro decidis krei laborgrupon por varbado. Jenaj personoj kunlaboras en ĝi: Marion Bélisle, Sonja Brun, Bruno Graf, Nicole Margot, François Randin kaj Patrick Rentsch. Okazis unua kunsido en Bern. La unua tasko estas pretigi aktualajn informilojn kaj varbilojn, ĉar ili mankas SES-nivele. La grupo ankaŭ studas teknikojn kaj metodojn por la varbado kaj preparas konceptojn por la Agotago. La estraro verkis SES-prospekton, kiu helpu varbi novajn membrojn.

**Celaro:**

La estraro aprobis celaron por la trijara mandato. Lige kun la Kampanjo 2000 de UEA ni volas levi la organizan kaj idean nivelojn de SES, precipe plijunigi kaj fortikigi la societon. La celaro aperis en *SESi 1997-5*. La celaro baziĝas sur enketo farita de la prezidanto ĉe grupoj kaj aktivuloj.

**JES:**

La estraro komencis kunlabori pli aktive kun Junularo Esperantista Svislanda. Komitatano de JES partoprenas laŭpove estrarajn kunsidojn de SES kaj kunlaboras en la laborgrupo por varbado. Por

logi JES-anojn al SES, la estraro decidis subvencii, t.e. redukti la kotizon por JES-anoj de 45.- al 25.- frankoj.

**Plibonigo de la servoj:**

Tio estis speciala celo dum 1997. Ni nombras kelkajn rezultojn: plibonigo de la bulteno *SES informas*, ebleco elekti inter *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto*, reorganizo de la gazetara servo, transpreno de 50% de ekzamenkotizoj, avantaĝo / rabato en SES-aranĝoj, regula subteno de la lokaj grupoj.

**Argus**

La estraro decidis malmendi la abonon por la observado de la gazetaro, kiu kostis jare 1500.- frankojn. La utilo ne egalas la kostojn. Ni uzu la monon pli efike kaj prioritate. La estraro organizos la observadon kaj kolektadon de artikoloj pere de la lokaj grupoj.

Ittigen, la 25an de januaro 1998
La prezidanto: Bruno Graf

# Rendevuo de aktivuloj

Tiu programero antaŭas la ĝeneralan kunvenon. Antaŭprogramo celas doni elanon kaj kunigi aktivulojn. Ni atendas reprezentantojn de estraroj kaj respondeculojn por interŝanĝi spertojn. Elektitaj parolantoj prezentos konceptojn, projektojn, spertojn. Kial ili sukcesis aŭ malsukcesis? La prezentitaj konceptoj povos esti modeloj por sama agado aliloke. Parolos delegitoj de Junularo Esperantista Svislanda, Germana Esperanto-Asocio, Kultura Centro Esperantista kaj Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

## Programo

**Basel: Sabate, 21an 03 98**
**Eklezia Centro**, Riehenring 129

1030-11: Claudia Gessler: Kiel JES sukcese varbadis dum semajnfino.
1100-1130: Ursula Niesert, sekretario de GEA: Varbi merkate per informbudoj - nova strategio.
1130-1200: David Buhlmann, prezidanto de KCE: Esenco kaj estonteco de KCE - pli bone profiti el ŝancoj kaj spertoj.
1200-1230: Ernst Glättli, sekretario de SAEF: Kiel SAEF ekspoziciis - Spertoj kaj rekomendoj.

# Kultura Semajnfino

Ni rememorigas, ke post la ĝenerala jarkunveno de SES malfermiĝos la **Trilanda Renkontiĝo** per kafumado je la 1600, prelego de Claude Piron je la 1700, kaj post la vespermanĝo distra vespero kun kantado de Claude Piron, filmo de François Randin kaj pretigo al la dimanĉa

programo. Tiujn informojn kun la aliĝilo vi trovas en la decembra numero de *SES informas* je la paĝoj 11/14.

## Kotizoj/abonoj 1998

En tiu ĉi eldono de *SES informas* vi trovas kiel kutime enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon por 1998. Mi afable petas, ke vi faru tion ne pli malfrue ol fine de junio 1998!

La sama enpagilo utilas ankaŭ por donacoj; ankaŭ tiaj estas ĉiam bonvenaj. Sed **ne** uzu ĝin por Agado 2003!

Bonvolu **nepre ĉiam** indiki sur la enpagilo, kion vi pagas, do ekzemple: *Kotizo 1998* aŭ *Abono 1998* aŭ *Donaco.*

**La kotizoj inkluzivas abonon al *Literatura Foiro (LF)* kaj al *SES informas (SESi)*:**

| | |
|---|---|
| **12.-** | **infanoj ĝis la 18a jaro** |
| **25.-** | **gejunuloj ĝis la 29a jaro** |
| **70.-** | **membroj ekde la 30a jaro** |
| **100.-** | **geedzoj** |
| **45.-** | **emeritoj, pensionuloj** |
| **65.-** | **geedzoj emeritaj** |
| **1400.-** | **dumvivaj membroj** |
| **900.-** | **dumvivaj membroj emeritaj** |

Tutkoran dankon pro baldaŭa pago!

La kasisto: Ernst von May

## Agado 2003

**Donacoj:** Françoise Badoux: 20.- Sandra Berva: 5.- David Buhlmann: 50.- Nancy Fontannaz: 30.- J.-J. Lavanchy: 35.- Gertrud Merz: 30.- Doris Schmid 35.-Armin Weidmann 15.- Kreskigu la donacaron al la Agado 2003 utiligante la pagilon 653677-40-1, kiu akompanis la decembran numeron de *SES informas*.

## *S.E.S. informas*

Por la venonta numero de *SES informas*, kiu aperos komence de majo **la redakcia limdato estas la 15a de aprilo 1998**.

## Unika aranĝo en Genève

UEA planas aprile kune kun la Alta Komisiono pri Homaj Rajtoj de Unuiĝinta Naciaro en Genève seminarion pri la lingva dimensio de la homaj rajtoj. Kadre de tiu aranĝo UEA omaĝos la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la 90-jariĝon de UEA.

Sro Andy Künzli, reprezentanto de UEA ĉe UN en Genève estas komisiita por organizi kaj kunordigi la seminarion. SES kiel landa asocio de UEA eluzas tiun eventon kaj antaŭvidas renkontiĝon kun la prezidanto de UEA, prof. Lee Chong-Yeong, kaj kun

UEA-estraranoj. La esperanto-societoj de Genève kaj Lausanne pretas kunlabori kaj preparas la renkontiĝon.

## Renkontiĝo SES/UEA

### 27an de aprilo en Genève

Organiza teamo nun preparas la programon. La estraro invitas niajn membrojn partopreni tiun unikan aranĝon. Tio ne nur koncernas ĉefe tiujn el Romandio, sed ankaŭ la aliajn el la german- kaj ital-lingvaj partoj de Svislando. Interesatoj mendu la programon al s-ino Nicole Margot, chemin des Lys 4, 1010 Lausanne. ☎ 021 653 14 617. Nome de SES ŝi kunordigas la renkontiĝon kiel estrarano kaj reprezentanto por Romandio.

## Seminario UEA/UN

### 28an de aprilo en Genève

La seminaria temo estas ***La lingva dimensio de homaj rajtoj***. La uzotaj lingvoj estas esperanto, la angla kaj la franca. La seminario unuavice destiniĝas al reprezentantoj de UN kaj de ne-registaraj organizaĵoj. Krome UEA invitas ankaŭ esperantistojn, kiuj plenumas respondecon aŭ havas meritojn. Partoprenantoj de la SES/UEA-renkontiĝo havas la eblecon ĉeesti ankaŭ la UEA/UN-seminarion. Interesatoj mendu la programon al s-ro Andy Künzli, Eigerstr. 78, 3007 Bern. ☎ 031 372 56 85.

# CDELI

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia,** Biblioteko de la Urbo, Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds, enirejo: pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55. Fakso: 032 967 68 29.

La jarraporto de CDELI mencias, ke estis katalogitaj 3398 novaj esperanto-libroj kaj dokumentoj en 1997. La vizit-antoj kaj esploristoj venis el Britio, Bulgario, Francio, Germanio, Hungario, Irano, Italio, Kroatio, Pollando, Slovakio, Svedio kaj Svislando. Kunlaboris al la aktiveco de CDELI Andrée kaj Claude Gacond, Cosette Sandoz-Giroud, la polo Tomasz Chmielik, la hungarino Monika Molnar kaj la franco Jean-Claude Caraco.

# KCE

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301 La Chaux-de-Fonds. ☎/fakso: (032) 926 74 07

### El la raporto 1997:

En 1997 113 personoj sendis donacojn al KCE por entute sumo de CHF 24'725.- Inter tiuj malavaruloj troviĝas 43 apog-antoj.

La someraj kursoj kaj kulturaj monatfinoj revenas al kontentiga frekventado kaj la jarfinon ĉe la Domparo partoprenis 18 feriem-uloj.

1997 transiros al la historio de KCE unuavice pro la aprobo de la Ekzamena Regularo kaj la difino de studprogramoj. La unuaj ekzamenoj okazos en 1998.

La Kultura Konsilio kunsidis du fojojn kun reprezentantoj de la esperanto-societoj de Basel, Genève, Lausanne, Luzern, de SES, de LF-koop, de Esperanta PEN-Centro kaj de la svisa ILEI-sekcio.

La Direkta Komitato alelektis novan membron: Sonja Koleva, kiu loĝas en La Chaux-de-Fonds proksime de la Domparo. Tiu juristino tre interese prelegis pri la temo *La suvereneco de la ŝtatoj* okaze de la januara monatfino, kiu sekvis la asembleon.

### Venontaj monatfinoj

**Marto 28/29**: *Fonetikaj aspektoj de esperanto* kun Daniele Vitali, fonetikisto.

**Aprilo 25/26**: *Renkonto kun* István Nemere, verkisto.

**Majo 30 / junio 1**: *Pentekosta migrado en la ĵurasa naturo* kun naturamika fakulo.

# S.A.E.F

**Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj**
Gertrud Eggenberger, Wurmbühlstr. 10
**8405 Winterthur** ☎ (052) 233 47 64

La decembra numero de la bulteno *Svisa Fervojisto* interese kaj detale raportas pri la ekspozicio de la Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Svisaj Fervojistoj okazinta en la urbodomo de Olten de la 6a ĝis la 21a de septembro. Pri la aktiveco de la esperantistoj ni legas: "Jen, kion faris ni, Esperantistoj: Ni prezentis kaj la sonkasedan kaj la videokasedan (MAZI EN GONDOLANDO) kursojn kaj kompreneble informis skribe kaj buŝe pri nia lingvo. Kiel ĉiam multaj vizitantoj antaŭe neniam aŭdis ion pri Esperanto. Plej ofte ili miris pri la fakaj kaj "libertempaj" eblecoj atingeblaj en Esperantujo, sed inter ili estis kelkaj ne plu junaj, kiuj siatempe aŭ eklernis aŭ eĉ finlernis la lingvon."

La **Ĝenerala Kunveno de SAEF** okazos en **Basel** sabate la 21an de marto je la 09.30 horo en la kunvenejo de la evangelia / metodista eklezio, Riehenring 129.

# Grupa vivo Basel

**Esperanto Societo Basel**
PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214 57 12.
Kunvenoj: 20.00 en Altersheim, Neubad.

La bazelanoj esperas, ke la trilanda renkontiĝo okazonta la 21/22-ajn de marto ne nur venigos partoprenantojn el Francio, Germanio kaj Svislando, sed ke ĝi ankaŭ varbe kontribuos favore al la loka esperanto-vivo.

*Rememorigo pri la datoj de la* venontaj kunvenoj: 23a de aprilo, 28a de majo, 25a de junio, 27a de aŭgusto, 24a de septembro, 22a de oktobro, 26a de novembro.

## La Chaux-de-Fonds

### Esperanto-studo

La duajn kaj kvarajn merkredojn de la monato inter 19h45 kaj 21h45: studo de esperanto kun Claude Gacond en la CDELI-salono. Se la enirpordo estas ŝlosita: sonorigu.

Kun la partoprenantoj okazis paroliga vespero kaj eklego de la romano *Kredu min sinjorino!* de Cezaro Rossetti. La venontaj studvesperoj okazos je la 11a kaj 25a de marto, 8a kaj 22a de aprilo kaj 13 de majo. Ĉiuj komencantoj kaj progresantoj estas bonvenaj. ☎032 967 68 55.

## Genève

### Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45

**Kunvenoj**: 18.15 en Restoracio Manora, Cornavin 4.

Jen kelkaj informoj ĉerpitaj el la monata organo *Brasikfolio*: En 1997 okazis 9 monataj kunvenoj kaj la komitato kunsidis dufoje. 2 someraj renkontiĝoj okazis sur la Insulo Rousseau. La grupa biblioteko nun ampleksas 393 titolojn. Eva Vischer transprenis la bibliotekistan funkcion, kiun antaŭe plenumis Camille Bickel. Andres kaj Camille Bickel gvidas *studajn renkontiĝojn.* Ĝenerala asembleo okazos la 3an de marto.

La 27/28ajn de aprilo okazos renkontiĝo kun la UEA-prezidanto Lee Chong-Jeong kaj simpozio en Unuiĝinta Naciaro pri la temo *La dimension linguistique des Droits de l'Homme.*

## Lausanne

### Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02

**Kunvenoj**: 20.30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo. La venontaj kunvenoj okazos je la 2a de marto, 6a de aprilo kaj 4a de majo. La venontaj diskut-rondoj en hotelo ***Continental*** okazos je la 23a de marto ekde la 18h ĝis la 20h. Notu tiujn datojn en via agendo!

La zamenhofan feston partoprenis 28 personoj por spekti filmojn de François Randin kaj de Samuel Monachon kaj por ĝui pri komuna manĝo.

## Neuchâtel

### Esperanto-studo

La trian merkredon de la monato inter 19h45 kaj 21h45: paroliga studo de esperanto kun Claude Gacond ĉe Gabrielle Gacond, Emer-de-Vattel 58, 2000 Neuchâtel. ☎ (032) 725 48 45. Komencantoj kaj progresantoj estas bonvenaj. La venontaj renkontiĝoj okazos je la 18a de marto kaj 15a de aprilo.

**P.P.**
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

# WIL

## Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎ 071 911 68 30. **Kunvenoj**: 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

**Marto 4**: Ludovespero gvidata de L. Senhauser.

# ZÜRICH

## Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 25 150 25 **Kunvenoj**: 19.15, Eisengasse 22, 8034 Zürich.

La 12an de januaro Claude Gacond prelegis pri didaktikaj novaĵoj en la esperanto-instruado. Sekvis faka orientiĝo pri la por-esperantaj ebloj de Interreto. La firmao de Dietrich Weidmann posedas propran rektan interretan servilon. Unu el ĝiaj nomoj estas http://www.esperanto.ch. Estis proponite al ĉiu esperanto-asocio en Svislando pretigi propran paĝon. Claude Gacond zorgos pri tiu de CDELI kaj Anĝelo Mellini pri tiuj de Luzern kaj SES.

La 9an de marto Bruno Graf parolos pri la strategioj de SES. Sekvos diskuto kaj respondo al la demandoj.

La *Guines-rekordlibro 1998* denove raportas pri la poemoj de Stanislaw Skorupski:

**Die meisten Sonette:** 2928 Gedichte verfasste der in Zürich lebende polnische Schriftsteller Jan Stanislaw Skorupski vom 1. Januar 1995 bis 12. Juni 1997, jeweils in Polnisch und Esperanto.

Ĉiam pri Stanislaw Skorupski, ni menciu, ke li akiris ĉe Arthur Baur polan version de *Fenomeno Svislando* kaj dissendis tiujn librojn al ĉiuj membroj de la Nacia Pola Parlamento kun aldonita letero reliefiganta la aktualecon de esperanto.